Ho-hoj kiam tiel fariĝas! —
La ej' estas tuta bluaĵ'!
Por pluraj tagoj sufiĉas.
Tia frand'! ĝi freŝigas min!
Kvazaŭas en reĝa kastel'.
Gusto de bona vin';
jen kiel en dolĉa fabel'!

Se venus la urs', la grandul'!
lok' devus esti por ambaŭ.
Mi cedus por tiu plandul',
giganta, timiga ja ankaŭ.
«Bonvole,» mi dirus nur,
«ne restu en sinretenem'!
Ja estas nura plezur';
vi servu vin laŭ la em'»

Se estus la ruza vulp',
gustigus mi lin per bato;
mortbatus mi lin pro kulp',
eĉ se estus li frato de l' papo.
Ŝteliĝas ja kio ajn
far tiu maroda best'!
Li bone kondutas laŭ ŝajn'
sen honto pro senhonest'.

Se estus la lupa poltron',
malica kiel kasisto,
per mia betulo-baston'
ricevus frapon ŝtelisto.
De mia patrin' sen hezit'
ŝiriĝis besto kun id';
mi traktus lin laŭ merit',
se pelus lin nun avid'.

Sed se la ĝentila junul'
altejen venus tenere,
ricevus li de la inul'
sur buŝon alimaniere.
Babil'! kion pensas mi!
La tago jam pasas al fal' ...
atendas brutaro ĉi; —
sopiras Dokka pri sal'.

## Renkonto

Dimanĉon sidas ŝi en la dekliv';
kaj pri esperoj dolĉaj ŝi pensadas;
la koro peze en la brust' frapadas;
vekiĝas revoj al tremanta viv'.
Miraĝo jen sur montokresto ŝvebas;
ŝi arde ruĝas; — jen la knabo venas.

Ŝi foren volas en konfuz' kaŝiri;
en sorĉ' ŝi tamen turnas sin al li;
salutas ŝi al li kaj li al ŝi,
kaj staras ne sciantaj kion diri.
Vortumas fine ŝi el sia mir':
«Sed kara vi ... altkreska kiel vir'!»

Ridetas ruĝa li, streĉante kruron:
«La knab' ne devas resti malfortul';
laboru li ja kiel plenkreskul'.»
— «Kaj jen, imagu, vi ricevis barbon!»
«Antaŭe ĝi ja tie estis;
sed eble ĝi nun iomete kreskis.»

Elaste li malantaŭ ŝton' glitfalas.
El poŝ' manĝaĵon tiras li kun rid',
ofertas knabĝenite por divid':
«Jen ovoj! Ilin mi por vi kunhavas.»
Kun rid' ŝi ĝuste antaŭ lin sidiĝas;
la brust' en trem', l' okul' al li fiksiĝas.

Jen sidas ili tiun varman tagon.
Li provŝercante logas ŝin al rid'.
Ŝi ĝojas kiel sur la branĉ' birdid',
sed povas ne vigligi babiladon.
Nun kiam ĝustas tempo por feliĉo,
ŝi sidas tie kvazaŭ en fremdiĝo.

Li petas pri rakont', sed estas for
nun ĉio en vizio vidigita,
perdiĝis tute elen el memor',
kaj ĉio estas kvazaŭ forgesita.
«Ne troloj! Ili mem prizorgu sin.
Prefere volas mi aŭskulti vin!»

Volonte li pri Skarebrot rakontos.
Elkreskis tie li sur hejma ter';
ja tie ili kvar bovinojn nutros;
ordigos li laŭ sia manier'.
Ŝi ĉiun opan vorton povas fidi;
demandas ŝi, ŝi ĉion volas scii.

Vagade ili laŭas rivereto jn
kun karesema ŝaf' kaj kun bovin'.
Pri greg' senzorgaj sentas ili sin.
Permane kaptas ili la fiŝetojn,
kaj roste fritas ilin sur ardaĵ',
kaj malplenigas sakon da nutraĵ'.

Ho feliĉeg'! — se tio nur ne estus,
ke nek la knabo nek la junulin'
kuraĝas en liber' rigardi sin;
ĝeniĝas li, sed viro esti devus.
Se ilin ne aparte tenus tio,
ho, kiel bona povus esti ĉio!

Nubiĝas nigre, pluvas sur paŝtej'.
Bruegas tondroj sur la monta kresto.
Sin ŝirmi volas ĉiu hom' kaj besto;
en roka kavo estas rifuĝej'.
Ne granda estas ĝi sed vizitinda.
Ĝin ili trovas loko ensidinda.

Kaj jen vesperon je la sun-ekkuŝ'
pli kunen ilin la sopiro pelas;
impulse juna brak' al kolo celas;

kuniĝas sentoplene buŝ' al buŝ',
kaj kapturnige ĉio sin transformas;
feliĉa ŝi en lia brako dormas.

## Kaprida danco

Ho hipp kaj hoppe
kaj tipp kaj toppe
en tago ĉi;
kaj nipp kaj nappe,
kaj tripp kaj trappe
en rondo ĉi.
Kaj estas am-en-sun',
kaj estas flam-en-sun',
kaj estas tril-en-val',
kaj estas bril-en-val',
kaj en ludemo
kaj kriegemo
en tago ĉi.

Kaj tir' ĉe nuko
kaj fal' sur ŝtupo,
pied' sur ej';
kaj formu ringon
kaj ekan svingon
jen en herbej'.
Kaj estas ĝu-en-sun',
kaj estas tju-en-sun',
kaj estas glim-en-val',
kaj estas mim-en-val',
kaj estas tirlo
kaj roja lirlo
kaj paca ej'.

Ho tapp kaj tapo
kaj puŝ' en kapo,
ĝin havu vi.
Kaj snipp kaj snufo
kaj kis' sur buŝo,
ĝin prenu vi.
Kaj estas rul-en-ring',
kaj estas sul-en-sving',
kaj estas salt-en-danc'
ne estas halt-en-danc',
kaj estas hej-hoj,
kaj estas salt-hoj
kaj tra-la-ti.

## Amo

La vigla knab' sorĉe min amigis,
min kvazaŭ birdon enkatenigis.
Triumfas knabo en amfier',
kaj min allogas ne plu liber'.

Min ligu firme per ŝnur' el fero.
Subigu ĉene min al sufero.
Ja, tiel premu min nun al vi,
ke l' tuta mond' iĝos for por mi.

Se majstrus mi sorĉkapablon mian,
mi kreskus tuj en animon vian.
Mi volus kreski, karul', en vin,
por ĉiam esti nur via in'.

*

Vi loĝas ene en mia koro.
Vi regas sola en la memoro.
Pensetoj ĉiuj, la tuta mi,
susuras nure pri vi, pri vi.

Se suno brilas de la ĉielo,
mi pensas vi estas ĝia celo.
Se vesperiĝas, tag' velkas for,
ĉu Injon havas vi en memor'?

Se vent' alteje vagade blovas,
hararon vian ĝi taŭzi povas.
Se gutas pluv' kiel kaŝa plor',
vin malsekigas ĝi dum labor'.

Ho ke la horoj rapide pasu!
Ke tempo tagojn forpele ĉasu!
Ĝojkantas tamen mi pli kaj pli.
Hura, dimanĉon ja venos li!

## Arbar-ĝoja

Ho, povra vi leporo,
vestiĝis silke vi,
pri via tim-angoro
nur scias nia Di'.
Laŭ kia cel' saltadas
vi, eta senpensul'?
Vi kion postkuradas
kontuze al betul',
  povra ul'?

Somero nun boniĝas
kun dom' en arbustej';
burĝonoj ŝvelaj iĝas
en via leporej'.
Ni estu ambaŭ gajaj
dum nuna suntempet';
kaj ambaŭ pigre ĝojaj
ni kuŝu en bosket'
  por dormet'.

Vi estas ĉarme bruna
en la somera rob';
sed estas vi tro juna
por esti mia knab'.
Ho, ke vi min ĝojigu
saltante en dekliv',
kaj ambaŭ amikiĝu
ni dum la tuta viv',
  tuta viv'.

## Demando

Li lante tabakon maĉas,
la maljunulo en Skar':
«Stranguloj nur babilaĉas
pri trolo kaj sorĉa far'.

Se tio, laŭ ili reala
malbono kaj mava mister',
ekzistus kun forto fatala,
ne eblus vivi sur ter'.

Sorĉiĝus ni suben kaj norden,
malsanaj en kapo kaj brust',
subiĝus al ili ni horden
sur tuta la tera krust'.»

La tuje parola edzino
respondis al li en rapid':
«Permesu ridon je l' fino,
ĉar estas nun tempo por rid'.

Vi viroj ĉiam ŝajnigas
ke ĉion komprenas vi;
sed ĉion mikskonfuzigas
vi, spite al via sci'.

La troloj devige sklavas
kiel gnomoj en ter' kaj sur fjord';
ne timu, — mi certe pravas, —
kvankam estus grandega la hord'.

Eĉ se multaj samkiel herboj
kaj kun forto de akvofal',
tro kadukas iliaj cerboj
por atenci al ni per batal'.

Atentas ili malmulte
dum sia brua kriad'.
Kondutas ili stulte,
sen ajna kuna agad'.»

## Bovin-voko

Bovino bela, ho mia bovin'!
Vagad' somera ĝojigas nin;
plej bonas herbo sur monta ter';
en val' torente fluas river'.
La vent' blovtuŝas kun milda ben';
susuras ĝi de la mont-seren'.

Bovino bona, ho mia bovin'!
Deklive vi sentos komforta vin;
lirladas akvo en fonta fluej',
kaj milde ombriĝas sur mola herbej'.
Paŝtadas huldro en tiu dekliv';
kaj al ni ambaŭ ĝueblas viv'.

Bovino dolĉa, ho mia bovin';
tempet' plezura favoru nin!
Serpenton mordantan forĉasos mi,
kaj muŝojn kaj kulojn mi pelos de vi.
Kaj pasos valse facile la tag';
vin gratos mi dum ripoz' post vag'.

Tintilo via je sun-subir',
nin loge gvidas dum hejmenir'.
Plenmama venos vi al hejma ej',
salŝtonon lekos vi ĉe l' kuirej'.
Melkita kuŝos vi por rea maĉ';
kaj sonĝe dormos en fid' kaj pac'.

Bovino bela, ho mia bovin'!
Prisonĝu paŝtejon kaj ankaŭ min!
Feliĉaj ni kantos dum tuta somer';
aŭtuna paŝtej' estos hejma ter'.
Jen venos bienen vi kiel reĝin',
kaj ĉiuj krias: Ho kia bovin'!

## Malbona tago

Ŝi nombras tagojn ĝis sabat-vesper';
dimanĉo venas; li promesis ĵure,
ke eĉ se pluvus ŝtonoj el la sfer',
li al paŝtejo tamen venus kure.
Dimanĉ' forpasas en nebul' kaj pluv';
en plor' ŝi sidas sola sur la tuf'.

Neniam li perfidos, scias ŝi,
eĉ se la malfeliĉo ilin provus,
ĉar tiam ŝi ne plue vivi povus,
sed sinkus, kaj ŝin morta trovus li.
Sed peza estas ŝia juna koro,
kaj haltas ne la larmoflu' dum ploro.

Ŝi hejmen venas en aŭtun-vesper'.
Pro timo preskaŭ ŝia koro krevis.
La tutan tagon estis pluv-veter',
kaj kvazaŭ en inund' ŝi vadi devis.
Kuŝejen nur rapidas ŝi sen son';
ripozi lite estas nun bezon'.

Sed ĵus la avo venis de l' preĝejo;
kaj nun kun pip' en buŝ' rakontas li:
«Feliĉos Jon se nun fariĝos ŝi
la lia, tiu in' de bonstatejo.»
Ŝi sentas pikon en la brust', Injet',
kaj svene ŝi ŝancelas al benket'.

Ŝi aŭdas pli ol kion ŝi deziris;
ŝi aŭdas ke la knabo, ŝia stel',
logata de alia dolĉa cel',
kun ajnaj belaj inoj flirte iris.
Sed nun li iras ruze por la svat'
al tiu in' en Os en riĉa stat'.

Kaj tiu faras sin al Jon aminda;
ŝi logas lin malkaŝe kaj sen hont'.
Li, kiel ĉiuj, scias laŭ rakont',
ke laŭ havaĵ' ŝi estas preferinda.
Kaj jen kun tiu ino sole dancas li,
kaj por aliaj inoj ne plu ŝancas li.

Injeto — bird' vundita sub flugil' —
kun sang' gutanta kiel brula larmo, —
sin treme kaŝas per la lit-kovril',
kaj febre tordas sin en plora varmo.

Kaj brulas vang'; ŝiriĝas korradik'.
Nur restas mort'; perdiĝis la amik'.

## Ĉe la paŝteja rojo

Lirlanta, vi roj',
kirlanta, vi roj'!
En valo vi glitas en klara blu'.
Sur spegula fund',
super ŝtona grund'
kun loga murmur',
kantanta susur',
kaj glimas sub sun' via onda flu'.
— Ho, jen mi ripozu, ripozu.

Brilanta, vi roj',
glitanta, vi roj',
deklive vi fluas sub suna bril'.
Kun kluk' kaj gluglad',
kun kant' kaj ĝemad'
kun rid' kaj ploret'
tra betularbaret'
dormigas en sonĝon via babil'.
— Ho, jen mi sonĝu, mi sonĝu.

Zumanta, vi roj',
klukanta, vi roj',
vi havas liton en musk' dum ir'.
En ĉi milda sin'
forgesas vi vin
pro flustra babil'
pri granda trankvil';
mildiĝas anime la prema spir'.
— Ho, jen mi memoru, memoru.

Plaŭdanta, vi roj',
fluanta, vi roj',
dum longa voj' kion pensis vi?
Tra dezerta ej'?
ĉe arbust' kaj florej'?
Dum subtera flu'?
Sub ĉiela blu'?
Ĉu iu plie solecas ol mi?
— Ho, jen mi forgesu, forgesu.

Siblanta, vi roj',
flustranta, vi roj',
kantete ludas vi en arbar'.
Al suno ridet'
kaj rid' en fluet'
kaj longa la vag'
por rivelo al tag' —
ne kantu pri mia pens' en amar'.
— Ho, ke mi ekdormu, dormu.
- - - - - - - - - - - - - - - - - -

Dolĉe kiel plor'
sonas harp-sonor';
logas ama sent'
en somera vent',
en la milda lul',
en la flua rul'
dormas for ĝi en trankvilo;

vekiĝas el silent',
ŝvelas en potenc',
kiel ŝaŭm-susur'
en la mar-murmur';
el la dorma ĉarm'
ŝvebas tona svarm'
amovarma, dolĉa trilo ...
. . . . . . . . . . . . . . .

Kun arĝentaĵo ĉe harar' ondanta,
kun broĉ' vibranta ĉe la mamoj rondaj,
ruband' arĝenta sur la brakoj bronzaj,
jen huldro ĉe betulo flaviĝanta.

«Pro perd' de perfidul' ne ploru vi,
kaj ne plu iru kun amara penso;
memoros ĉiam li per sia menso,
kaj pro konduto fia pentos li.
Ĉagren' plej peza fine eĉ venkiĝos;
sur bela suna mont' vi renkontiĝos.

Sed kiu en aflikto post perfid'
en sia kor' sopiras en doloro,
ŝi scias kiom longa estas horo; —
vi sekve ne plu restu en rigid'.
La kordojn ofte aŭdis vi sonori;
amik' sopire devas pro vi plori.

Deziras al vi bonon mia frat';
kaj nokte lia kant' en val' plendadas;
mizeranime tagojn li vagadas,
sopire vin serĉante pro la ŝat'.
Ne devas vi forturni vin en frido
de tiu kiu amas vin en fido.

Jen kiam vintrostelo montros sin,
ni Antaŭ-Julon estos festenantaj,
kaj nevideble monten levos vin;
ne timu, ĉiuj estas vin ŝatantaj.
Pri tio scias ne la vilaĝaro.
Amik' reportos vin el la montaro.»

La huldro velkas for en ĉeaj pratoj.
Vekiĝas el duona dorm' Injet',
kaj flugas sammomente for videt'
per de lagopo bruna flugilbatoj.
Ŝi gapas per l' okul' en sonĝo ĉi.
Memoroj hejmaj tuj forgesis ŝi.

## SUR TROLA MONTO

### Vekiĝas

Velkas luno post volba ir'
sude en horizont';
steloj en sorĉa, svarma delir'
falas el stelara pont'.
Blovas el nordo la vintra spir'
super la montoj.

Nigra nokto vastigas sin,
vindas la teron en brum';
elen el fendoj kaj el ravin'
flagras blua vaglum'.
Rid' resonas laŭ roka spin'
  super la montoj.

Tranĉe ŝira trumpeta signal'
krias de l' monta pint';
viglas kurbuloj en kruta val',
rampas el rok-labirint'
subteruloj al festival'
  super la montoj.

Vintra lumo vekiĝas en nord',
streĉas la verdajn arkojn,
pelas susure sub volba pord'
antaŭen frostajn sparkojn;
brilas arĝente la flamo-hord'
  super la montoj.

Treme pafiĝas la flama glim'
super la alta montej';
ŝtale frida glacia senfin'
radias sur kruta rokej'
vibre en danc' sur roka spin'
  super la montoj.

Streĉas sin lum' super pint-kulmin',
ligas radiojn en nodon,
ŝutas sin dise vibra glim',
formas tendan volbon.
Staras jen hal' el radi-gobelin'
  super la montoj.

*

Kiam ordiĝis tiu pulul';
kraĉas trumpeto sonegon; —
venas bruege la nigra ul',
eksidas li sur la Ŝtonegon.
Fajre ardas lia okul'
  super la montoj.

Jen alvenas draŭgoj,
klakas krur' kaj brak';
donis sin ili al Hida Ul';
sekvis eterna plag'.
Fride susuras kant' el tumul'
  super la montoj.

Venas saltanta kaprulo,
fulga nano kaj gnom',
nikso, draŭgo kaj reaperant'
el sia enmonta dom',
ĉiu sepmejloj-paŝa kurant'
  super la montoj.

Venas trol' kaj trolino
tra dezertaj altejoj,
rajde sur balail' kaj baston'
sorĉante per akraj blasfemoj.
Terure ululas la galdra ton'
  super la montoj.

Kolektiĝis la greganar',

praaj kaj ankaŭ novaj:
grake grincas el trola ar',
el ĉiuj gorĝoj gnomaj.
Ridoj salute ruliĝas de l' ar'
  super la montoj.

Kiel sur ŝaŭma maro ŝtorm'
la nigra kanto vekiĝas;
per tonoj el la tombeja dorm'
glore la reĝ' salutiĝas;
kreske, disflue ĝi velkas for
  super la montoj ...

## Ili salutas sian estron

Sidu vi en prosper',
Altulo en Infer',
reĝo de l' ter'!
Estu potenca vi!
Venke progresu vi!
Mondon suben premu vi
de la sud' al nord'!

Per via anatem'
sob malamik' en ĝem',
en trem' kaj tim'!
Sed via sindonant',
senbrida diboĉant',
laŭ sia voj' de mensogant'
estu en estim'!

Per la satana nom'
blasfemu ĉiu hom'
tri fojojn tri.
Vi fojojn tri kaj tri
nin estros jen kaj ĉi;
havas nin ĉiujn vi
ĝis la tempa fin'!

## Ekzameno

Skribas kun libro genue Satan'
per ruĝa sango la nomojn;
li kripte listigas per krifa man'
vivajn kaj mortajn homojn.
Laste ĉiu nova an'
  en la gregon.

Preĝon antaŭ la nigra ul'
ili starante raŭkas.
Por ĉiu junulo kaj eĉ oldul'
Diablo la gorĝon faŭkas.
«Ĉu volas vi nun je Antaŭ-Jul'
  en la gregon?»

Unuanime per jesa dir'
kriĉas la kongregacio.
Vice ordigas sin in' kaj vir'
kvazaŭ por konfirmacio.
Prov' postuliĝas antaŭ enir'

en la gregon.

## La nigra katekismo

«Ordono unua, kia ĝi?»
— Laŭ aliuloj kondutu vi.

«Kaj pri la dua, ĉu havas vi konon?»
— Malbenu en koro Dion kaj homon.

«Ĉu scias vi mian trian okupon?»
— Dimanĉon soru preĝejan ŝtupon.

«Kaj nomu ankaŭ al mi la kvaran!»
— Subtenu ĉiam la plej altstaran.

«La kvina?»
    — Se antaŭas iu,
neniam indulgu mi al tiu.

«La sesa?»
    — Estu interne fiulo,
tamen ekstere bela brilulo.

«La sepa?»
    — Estas la trola feliĉo
kaŝe ŝteli, kaj vivi en riĉo.

«La oka?»
    — Plej bona defendo
estas mensoga pretendo.

«La naŭa?»
    — Vi estu rapida ruzul'
je flar' de bieno de aliul'.

«La deka ordon'?»
    — Al najbar' perfid'.
Vi ŝatu gajni per ruza insid'.

«La fundon de l' saĝo, memoru ĝin ĉiam!»
— Forgesi la akran malamon neniam.

«Kion vi kredas?»
    — Ĉiam fripono
venkas super atencoj de bono.

«Kion vi preĝas?»
    — Ke fariĝu
tiel ke l' mondo neniam boniĝu.

«Kion plej kore vi deziras?»
— Posedi la mondon mi sopiras.

«Ĉu tiu volo vin tute plenigas?»
— Per sango servute al vi mi min ligas.

«Kaj poste?»
    — Ke l' pakto ĉiujn jarojn
validu, vizitu mi vian altaron.

*

Genuas nun la nova trol';
eksonas ĝoja kri';
Ŝtormas hurlo de l' tuta popol',
kreskante pli kaj pli.
«Li fidas! Li estas de nia skol'!
En la gregon!»

Por ĵuro je la sennoma grandul'
krifojn Satano eklevas.
«El mia potenc' estu vi potencul';
mi ĵure tion promesas.
Eterne mi prenas vin mia subul',
en la gregon!»

## Stela falo

Paŝas antaŭen olduloj,
inoj kaj poste viroj;
Ĉiu raportas el vilaĝar',
pri siaj malicaj iroj;
kontenta Satano pri tia far'
ridas al ĉiuj.

*

### Laponino

Malsanaj mi sorĉas bestojn kaj homojn
kaj sendas la muŝojn flavajn;
rompas mi pacon, vekas ŝtormojn,
fidiras vortojn malpravajn.

### Vagantino

Ŝteliston malŝlosi lernigas mi,
trankvilon dum murd' al murdisto;
la lakton al sango sorĉigas mi,
mortfalu la best' ĉe l' melkisto.

### Ore vestita virino

Kreskigas mi inter knabo kaj in'
malfidon per fia vortero;
ja kiam kverelas edz' kaj edzin',
forvelkas herbo sur tero.

### Malgrasulino

Malicon ĉe viroj vekas mi,
per pens', kiu fidon detruas;
mi scias ke kiam ekflamas envi'
facile mi mavon instruas.

### Ĝibulino

Ĝentilajn virojn kun firma sinten'
kaj fid' je si mem mi ne ŝparas;
malkuraĝigas mi per venen',
kaj ilin perfidaj faras.

### Strabulino

Transturnas mi vidon de dolĉa in';

kontenton neniam ŝi sentu;
al trol' kaj vagul' ŝi forĵetu sin,
en morton sin tiel lamentu.

La viv' aridiĝas en frida mens',
kaj suben la dorso kurbiĝas;
la koro fariĝas glacio sen sens',
kaj ĉio pri ŝi malsaniĝas.

Sorĉ-kuiristino

Se bebon naskas in' post perfid',
pro mia sorĉ' ŝi deliros.
Kaŝe al morto velkos la id'.
Por Julo mi ĝin kuiros.

Duone nuda trolino

Kuras sorĉita knab' kun mi
ĝis karno kaj cerb' moliĝas;
fine bebe vindita li
solece, putre foliĝas.

Virino kun okulvitroj

Mi volas ke velku la viv' en burĝon';
per tio ĝis nun ni altiĝis;
mi vekis la inon el stat' de sindon',
kaj ŝin postuli lernigis.

Ŝi fortas en sia eltrudem',
ŝi ĉion parceligos;
kaj se la vir' ne naskas mem,
ŝi ne sin edzinigos.

Sorĉisto kun bovlo

Se viron ni ligu al obeem',
ne ŝparu ni freŝan bieron;
lamiĝu per ĝi lia estra em';
dormigos ni lian fieron.

Nuda sorĉisto

La progresema hom' en labor'
malfacile kaptiĝas; —
sed per sia perlaborita or'
de mi al luks' li logiĝas.

Sorĉisto kun hakilo

Bonstatajn vilaĝojn incitas mi
al inter-batalado;
okjara rikolt' disipiĝas pro ĝi
per nura oktaga luktado.

Sorĉisto senzorgema

Senpova la ul' kripliginte sin
hakinte for la pugnon;
predikas mi pacon al la kokin'
antaŭ ol ligi la vulpon.

Sorĉisto kun vergo

Etulojn en monton mi sorĉas sen hont',

kaj sklavaj ilin vestigas;
ne vidos ili ekster la mont';
per libro l' okuloj kovriĝas.

Sorĉisto kun sako

Sako plena je pek' kaj horor'
pezigas la ŝultran paron;
per serur' kaj katen' el arĝent' kaj or'
mi sorĉis la tutan homaron.

Delire misvoje iras povrul',
l' animon turmentas plagoj;
sur mola lito tordiĝas riĉul',
putrigas lin bonaj tagoj.

Sorĉisto kun skurĝo

Estru mi laŭ propra vol',
kaj pensu mi por ĉiuj;
antaŭas mi, kaj sekvu popol';
kiel mi gloradu neniuj.

Duvizaĝa sorĉisto

Mi sorĉas la rojon; ne fluu ĝi;
krepusko regu la vivon;
antaŭen kaj reen volas mi;
kaj dekstren samtempe kun liven.

Statas kampar' kiel morta lag'
kie strangaj bestoj putriĝos;
nenio instigas je nokt' aŭ tag',
marĉo ĝi baldaŭ estiĝos.

Ĉeval-ĥirurgo

Spacan ejon havu etul'
kaj estru etulmaniere;
sobigas ĉion tiu ul',
kaj iĝos en mondo mizere.

Kiu kreiĝis al granda afer',
sidu stulte ĝentile;
mi tranĉas, kaj sen sia vira ekster'
laboros li poste ŝpinile.

Insidanta sorĉisto

Ofte fatalon spertis mi;
nun ruze per sorĉ' agitas;
mi inter-malicon vekas per fi',
kaj perfide erarigas.

Se gajnas vi ne per honesta far',
vi certe fiule prosperos;
mi tion instruis en vilaĝar';
per tio ĝi multe suferos.

Viro kun buŝumo

Lernigas mi homojn pri kaŝa perfid'
kaj prefero de trompa konduto;
similas al mi pli ol unu homid'
akceptanta maljuston en muto.

Nigramanteluloj

Psalmojn kaj preĝojn mi en murmur'
remaĉas kun evangelio,
ĝis homoj kredas: Jen voj' de l' natur'!
— kaj forgesas la volon de l' vivo.

Sorĉistego

Altule mi paŝas tra l' vilaĝar',
postlasas neniun faregon,
ke tiu lerninte laŭ mia far',
ne fidu plu iun grandegon.

Eta sorĉisto

Mi havas ilon en mia malfort':
Se iu distingiĝas,
mi klaĉon per ruza, venena vort'
sekrete disvastigas.

Etuloj ĝojas en sia atend',
pensantaj etul-malice;
grandecon kotŝmiras mi per ofend',
kaj sekvos min ili laŭvice.

Skeleto

Ĉiujn ulojn inklinajn al ced'
venene mi senfortigas;
laciĝas ili pri ĉio en ted';
por morti sin ili kuŝigas.
- - - - - - - - - - - - - - - - - - -
- - - - - - - - - - - - - - - - - - -

*

Satano kun kontenta rid'
ĝoje donas inspiron:
«Se pluen daŭros vi en hid',
la vivo atingos subiron.»
Laŭdas li pro sindona fid'
al ĉiuj.

Ricevas ili al roba rand'
Longvost-ordenon honoran;
signifas tiu sulfur-ruband'
la atingaĵon plej gloran;
Nigrulo signas per kap' kaj man'
al ĉiuj.

Honoro estu al meritul';
laŭ aga efik' vi altiĝu;
kavalir' aŭ nobel-rangul',
aŭ eĉ «pavego» nomiĝu;
krife salutas Diabla ul'
al ĉiuj.

Petanto

Alrampas vir' kun ruband' sur frunt',
la kapo ore kronita;
malpura estas mantela punt'

ĉar kvazaŭ en koto trenita.

«Sinjor' de Infero, aŭskultu min,
mi reĝ' sub turmentoj fobiaj;
por rekompenco mi serĉas vin,
ĉar estas mi nun el la viaj.

Por multaj estas ĝuinda frand'
pacan landon rabi;
Ne zorgis mi, perfidiĝis land'
kaj popol', kiujn devus mi savi.

Sed poste rabistoj foriris en tim'
sen fiero pro sia ago;
rikanas popolo en malestim';
jen pro la perfid' mia pago.

Mi petas al vi, Sinjor' en ver':
forigu nun la signon,
ke povos mi levi en liber'
la frunton kaj havi dignon!»

Per nomo Satano enskribas lin,
kaj ridas el fundo de l' koro;
li premas la reĝon stampitan al sin'
por kiso al buŝ' en fervoro.

«Dankon, la guston de sulfur'
ĉiame mi ege emis.
Donis ĝin ĉiu rompita ĵur',
kiu sob liberecon premis.

Kun Judas enskribiĝis vi,
laŭdindas tie stari.
Pri stampo brula povas mi
por vi nenion fari.

Ĝin vi havos en vivo kaj mort',
en rakont' kaj hejmoj subteraj;
forigi ĝin povas neniu fort',
eĉ ne la flamoj inferaj.»

## Alta gasto

Venas sur falva ĉeval' rajdant',
skeleto en nigra mantel';
Serpon li firme ligis ĉe flank',
haltas ĉe l' nuna cel';
grimace salutas li majstron de Hel,
  tra la nokto.

«Hoj-raŭ!» li raŭke tusas,
«gajon en ejo seanca.
Ĉiloke preferas mi loĝi.
Altulo! prezentu sidlokon.»

Satano el seĝo sin levas.
Palpas li frunt-rubandon.
«Sinjoro frato, bonvena amik',
trovas ĉi tie vi hejmon.
Komencos ni dancon kun sving' kaj kik'
  tra la nokto.»

«Hoj-raŭ!» la Morto raŭkas;
«ĉiame, amik', mi vin amis.
Laca vagadas mi sklave
tra l' mond' sur ter' kaj ondoj,
kolera al Majstro mi servu,
forigi vivon por vivo.
Ne lukris mi gajnon salajran;
senpage mi devas agi;
se igu mi senhomiĝon,
rapide rekreskas la idoj.
Ĉi tie la ĝustan estron
karan mi rekonas;
ĉi eje libersenteme
mi dancu la morto-dancon.»

«Pli ol volonte,» alkantas diabl',
«deziras mi al vi orgion;
oftege sur vojo laŭ kapabl'
perfidis vi la vivon;
kaj sendis homidan rostaĵon por tabl'
  tra la nokto.

Profitas mi de ĉiu branĉ'
kiun vi tranĉas juna.
Al certa venko do estas ŝanc'
per nia labor' komuna.
Nun akorde ni tretu al danc'.
  tra la nokto».

## Troldanco

Tretadas kun klaka son'
ĉevala ŝuo kaj huf';
paŝetas piedo sur ŝton',
trotiĝas sur rok' kaj tuf',
kaj kvazaŭ monta nebul'
blovata de venta ĵet',
infestas trola pulul'
en onda impet'.

Knarad' de rusta riglil',
fajfad' en truo kaj fend',
ĉe pintoj ulula tril',
siblado en frida vent';
alteje ŝrik' kaj krieg';
de tiu kant' de infer'
danciĝas sovaĝa greg'
tra nokta veter' ....

En tiu rokplena mond'
sin svingas kruro kaj vost',
turniĝas sovaĝa rond'
kun huf' kaj skeleta ost';
ĉi valson per fia kanzon'
alkantas inaro de sorĉ'
kun rid' kaj volupta ton'
kriĉante el gorĝ'.

  Estis trol' por trol'
  en lasciva fol';
  altira hok'
  estis Gro el Rok';
  sorĉiĝis knab';

tiun Knut el Kab'
ŝi sorĉis al fola falo.

En sia obstin'
avidis li ŝin;
en cerba nebul'
ŝin kuntiris la ul',
kaj la fino — hi-hi!
al la pastro — hi-hi!
Ridegis tuta valo.

Fariĝis jen ŝanĝ'
por nova aranĝ';
mordadis nun ŝi
kaj sakris al li;
rokeje en fol'
ŝi ludis kun trol',
ke eĥis de rid' ĝis la foro.

De Knut ĉiu id'
foriĝis el vid',
grasiĝis por buĉ',
pikiĝis por buĉ';
surtabliĝis buĉaĵ'
kun branda trinkaĵ'
por Knut, manĝanta en ploro.

Tediĝis tamen ŝi
de tiu viv' kun li;
sopiris tro
tiu vosta Gro,
eĉ se ŝi krie plendis.

Laŭ sia fia cel'
ŝi ŝlosis lin en kel';
ekflamis brul'
de mur' kaj ul',
kaj ĉielen glimon sendis.

Ho-ho! kia brul'!
Streĉas sin flam'!
Vi Roko-fendul',
jen lito por am'.
Jen grasa odor'
el flama fervor';
por Julo ni fritas lardon.

Hoj ul' el sub-ter',
jen mi en liber';
infera huful',
jen ludo ĉe brul';
hoj gnom' el trolej',
hoj jen plezurej'.
Ni ĝuu la varman ardon — — —
- - - - - - - - - - - - - - - - -
- - - - - - - - - - - - - - - - -

Injeto timas, ne aŭdis ŝi
kanton pli fian ol tiun ĉi.
Sed dancas trolar' kiel bestoj.
Flirtas, kuradas kun bru' kaj rid'
en hida avid'
diabloj aere en salta senbrid'
kun klake svingantaj vostoj.

Vibras estinge nordlum' en fon';

vento hojlas kun kriĉa ton'
tra sombraj monto-fendejoj.
Hurlas krioj kaj mok-ulul'
tra nokta turbul';
en danc' karakolas la trola pulul'
super la nudaj rokejoj.

*

Tonoj vekiĝas en vibra trem',
kantas susur' kvazaŭ roja ĝem';
sonĝoj en nokto soras.
Klukas ludo el monta rokej';
resonas fendej',
kiel sub pluva flu' sur altej'
amar-sopire ĝi ploras.
- - - - - - - - - - - - - - - -
- - - - - - - - - - - - - - - -

Jen dancas la gnomo en bela kolor'
kun ringoj ĉe l' haroj ondantaj.
Li logas Injeton per danca fervor'
kun tonoj ĉirkaŭe vibrantaj.
  «Ravege por vi!
  Vi loĝu kun mi!
Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

Foriĝos en kanto kaj lud' la timid',
kaj bela la dancon vi tretos;
forgesos vi ĉion de l' vunda perfid'
kaj plue eĉ ne suferetos.
  Pri ajna sopir'
  je unua dir'
vin servos inar' mia laŭ dezir'.

Kombiĝos de unu la bruna harar',
kaj plektos la dua la tufon;
beligos vin tria per kron' kaj perlar',
ĉemetas la kvara la mufon.
  La kvina knabin'
  per ŝuoj servos vin;
freŝigos la vangon la sesa in'.

La sepa el mia knabina ar'
susure ludigas la citron;
turniĝos de l' oka stekaĵ' sur l' ardar',
verŝiĝos bier' en kalikon.
  Aliaj en rond'
  en danc' kiel ond'
vin lulos en nia feliĉa mond'.

La naŭa plej loge vin distros per kant'
pri inoj kaj viroj svatemaj;
reĝine kunpaŝos vi mem en la danc'
en brilo de ŝtonoj gemaj.
  Neniu el ni
  egalas al vi,
dancanta sur orponto en graci'!»

«Malmulte min logas la blua montej'
kun brilo glima en haloj;
mi vidu la knabon el hejma ej',
kantiĝis tiel en valoj.
  Ho knab' mia, vi!
  Vin fidos ja mi!
Por ĉiam kune ekloĝu ni!»

«Ke vidu vi veron pri tiu knab',
nur turni la kapon necesas.
Kun ino li sub la tegmenta trab'
kaj hejmon kaj mondon forgesas.
  La ama sopir',
  nun nokta delir'.
Por mok' Montarino, ne plu por dezir'.»

Rigida ŝi staras en tag' kiel rok';
la kor' ŝia velke fridiĝas;
memore ŝi vidas en senta ŝok';
la mondo por ŝi glaciiĝas.
  Kaj turnas ŝi sin.
  «Nun havu vi min.
Volonte fariĝu mi montarin'.»

Eksaltas la gnomo sur roka voj';
li devas ja sorton laŭdi.
«Sed nun vi forgesu kaj vivu en ĝoj';
min sekvu, kaj povos vi aŭdi
  pri mia reĝej'
  de kamp' kaj montej',
pri olda Gumlo en sia ej'!»

## Montaj troloj

Basa plafon'. Distas muroj.
Prujno kaj blu-glacia glimo.
Sombra hal'.
Arĝento-branĉoj en ŝtono brilas,
kroĉa hok' kaj inversa runo.
Aĉa blovo traa kvazaŭ
el kel'.

Tablo larĝa sin vastigas.
Hirtharuloj, nazegulinoj
sidas en rond'.
Muĝo, hurlo, lup-ululo,
grunto, grumblo, kruda krio
en tiu troleja
mond'.

Gratas krif' skabion, kruston;
sango gutas; tondre ondas
rida kriĉ'.
Ege drinkas aviduloj;
mildetiĝas. Ogrin' kaj ogro
tire frotas rostron al muzelo.
Delic'.

Peze sur la hala planko
pigre sin trenas gejunuloj,
laŭvica ar'.
Lante turnas sin ŝveba danco.
Bastokordaj tonoj vibras.
Svingas sin lace, oscede, plende
ular'.

Obtuze profunde en obskuro
ogrin' ridaĉas, trol' seksardas
en am-avid'.
Aŭdiĝas hurlo, ŝaŭma siblego;

krif' al krifo, dent' al gorĝo;
malamikon senhaŭtigus
ajno.

«Fie mensogis vi, montulo!»
krias Injeto: «Hide aspektas
via gvardi'!»
— «Ega eraro!» tuj respondas
la gnom' afable: «Tiuj, vidu,
estas sklav-labora aro
mia!»

«Potenco tia, — ĉu ĝi sklavu?»
— «Senpotencas malluma nescio
dum tuta viv'.
Jen vi nun mem aŭdu.
Provu ni saĝon de troloj,
basan, malluman, sen senco
en ĝi.»

Alpaŝas li tiun plej aĝan:
«Kial kamparano semas printempe
semon? Nu?»
«Hu?» — tiu re-demandas.
Strabe, cerbume la trolo gapas.
Ridaĉe pork-okule rigardas:
«Hu?»

Alpaŝas li tiun plej junan:
«Diru kial sopiras maren
la river'?»
Tiu malvole paŭte grimacas,
spite li skuas longajn orelojn:
«Fluu ĝi kie kaj kien ajn
sur ter'.»

Alpaŝas li nun trolinon:
«Kial infan' je malferm' de okuloj
kriĉas?»
Gapas la trolino: «Kriĉu ĝi.»
Strabas malice al Injeto.
Flaras, grimacas, akre per dentoj
grincas.

«Tia la sklava parencaro.
Mankas demandoj; respondoj nur estas
tiaj de sklav'.
Ni prefere profunden iru
kanton aŭskulti lamentadan,
vortojn kolerajn de olda Gumlo,
praav'.»

## Gruntejo

[Saĝula Ej']

Profunde en la Skaro-enorm'
kaviĝas halo el kupro;
verdigre altiĝas la volba form'
kun glimo de gutoj el supro.
Bluetas glimo kvazaŭ en dorm'.

Gutadas fluet' kiel salivum'

en tiu rok-hala sombro;
lacertoj siblas, obtuza zum'
oscede sonas en l' ombro.
Serpent' meandras en sonĝa mallum'.

Angule en kaŝo en sombra krepusk'
tra tempoj Gumlo sidas;
Li sekan radikon similas en kusp',
la membroj torditaj rigidas.
Sur kapo kreskas likeno kaj musk'.

«Vi Gumlo, gardanto de l' tradici',»
alkriĉas la Blua-mont-gnomo,
«la Gumlo-kanton eldiru al ni;
ĉiamu en mond' ĝia nomo.
Rubaĵojn nur kantas junuloj ĉi.»

Jen kvazaŭ streĉiĝas horloĝa risort'
ekgurdas la voĉa knaro,
kaj grince eliĝas ĉiu vort'
el olda Gumlo-kantaro,
en serĉo de ĝia praa fort'.

## Kanto de Gumlo

Kantas Gumlo
pri pra-erao.
Regis gigantoj
la rondon mondan.
Nokto timiga
kovris la teron.
Mankis luno.
Mankis steloj.
Flamis nordlumo
sur glaciejo.
Val' kaj kavo
en kaŝo sonĝis.

Bone estis
sporte ludi,
montojn fendi,
fajron ŝuti,
ŝtormon veki
kaj maron kirli,
glacion ŝovi
kun tondra bruo.

Bone ... bone
lukte ĝoji,
harojn tiri
kaj dorsojn rompi,
kapojn skrapi,
korne piki,
krife ŝiri,
orelojn tiri.
Bone ... bone
nur inerti.
En trankvilo
krurojn ŝpari
kaj neniun
taskon tuŝi.
Satŝtopita
dolĉe dormi.

Neniam zorgo
pro helaj vaporoj.
Neniam suno
al okulo.
Sen kreskaĵoj
la vastaj valoj;
neniu fum'
el hejma ej'.
Tago dormis
mortodormon.
Prujne blankis
trolaj mondoj.
Land' en kvieto,
regno en pac'.
Tempo staris.
Ĉio mutis.

Ve! Ve!
Pereas erao.
Ve! Ve!
Fi-epoko ...

Kreskis Alvo.
Venis azoj.
Sun' vekiĝis;
tag' ekregis.
Sinkis nokto
nebuleja.
Venis al fino
gigant-erao.

Vintro ĉesis;
printempo varmis.
Glaci' degelis.
Torentis akvoj.
Ĝermoj kreskis;
plantoj kreskis;
arbar' densiĝis
nebul-deklive.
Kreskis viroj
kaj virinoj.
Fajro fumis
sur fulga ejo.
Ŝtalo plugis
duran grundon.
Sin vastigis
verdaj kampoj.

Sun' subiris,
Sun' leviĝis;
tago estris
mondan rondon.
Temp' ĝermigis
longajn pensojn,
fiksis celon,
planon, solvon.
Lukto! Lukto!
Anim'! Anim'!
Jen, junuloj,
instiga vorto!
Ĉio anima
serĉas supren.
Ĉio trola
ŝirme sidu.

Jotuno glora
en mont' kaŝiĝis,
rampis angulen
malfiera,
En roka kavo
malbenis tagon;
de l' nokt' profitis
por friponaĵo.
Vente pelis
primaveron.
Sendis neĝdunojn
kaj maliculojn.
Kovris vilaĝojn
sub gruz' kaj sablo.
Turnis ŝtonojn;
ŝveligis glacion.

Baris, haltigis
per mur' kaj mallumo.
Nebulon kaj nubon
al sun' li ĵetis.
Eltiris radikojn.
Kirlis maron.
Vekis vintron,
fimbulvintron.
Sed sun' leviĝis,
pelis nebulon,
rompis glacion.
Neĝ' degelis.
Herbo verda
kovris grundon.
Vivo ludis
laŭ tuta land'.
Rekreskis arboj
kun milda ombro.

Degeneris
parencaro.
Krevis sub suno.
Ekŝtoniĝis
pro di-martelo
kaj blanka kruco.
Unuopuloj
poste sidas
en roka ekzilo,
malbenas tagon.
Kelkaj cedeme
sangon fuŝmiksis,
malhonoris
parencaron
per hontaj nuptoj
kun homaj idoj,
naskis kun elfoj.
Gnomo nun
la regnon estras.
Senkuraĝa
la aro malkreskas,
kurbe ŝteliras,
eĉ humile.
Malmulto restas
el praa gento;
neniiĝis
granit-gigantoj.

Aŭdu, idoj,
vokon malaman!

Brava jotun'
helpon bezonas.
Ĉu rilatiĝi
kun favaj vermoj,
ĉarlatanoj
el fuŝaj ejoj,
magiistoj,
sorĉistinoj,
plej fiaj pleboj
en la mondo,
vagvostuloj
kun nigraj libroj,
troloj ne,
homoj ne.
Hu! Hu!
Ploro-tempoj!
Hu! Hu!
Ĉagreno-tempoj!
Kaj el ĉiuj
plej alte estras
la Nub-Mensulo
sulfurolanda,
lamul-diablo
kun huf' ĉevala,
blagant' duone,
duone pastro;
lin kiel estron
ni devas laŭdi;
estras li
giganto-regnon.

Ekstaru ĉiuj
kun juna sango,
ek, kuraĝuloj,
por jotun-regno!
Neniu giganto
trankvile pigru
ĝis el la alta
firmamento
la ruĝan sunon
ni suben tiris,
kaj ĉio silentos
en ragnarok'!
\- - - - - - - - - -
\- - - - - - - - - -

Flariĝas foje en sombra angul'
kun stranga ĝem' kaj snufado;
etendas brakojn ĉiu kriful';
kun krio, grunt' kaj siblado:
«Uhu! Odor' de kristana ul'!»

Krucigas ŝi brakojn per tuja far',
Injeto; ĉe brust' rigidiĝas ...
Ŝaŭme krakas kvazaŭ el mar',
kaj ŝi al tag' revekiĝas.
— Sola ŝi nun en deklivo Skar'.

## LA GRANDA LUKTO

### Aŭtuno

Nun surfe ruliĝas mar' al bord'
kun ondokrestoj ŝaŭmantaj.
Rompiĝas kreve ilia hord'
ĉe troloj tie loĝantaj.
Krias venteg' en sovaĝa liber'
super abismoj sombraj;
elĵetoj ŝprucas sur rifo kaj ŝer'
en tagoj aŭtunaj ombraj.

Mi aŭdas timiga demonkantad'
de trolino tra surfon rajdanta.
Ŝi estas per galdro kaj sia sorĉad'
mizeron antaŭdiranta.
Jen ĝeme, jen moke aŭguras ŝi
pri plago kaj pri sufero.
Sorĉkante avertas la draŭga furi'
pelante vivon de l' tero.

Pro ondaj batoj tremas la grund'
kaj pala ĝi frostas nude.
Fridiĝas korto kaj sin' ĝis fund'.
La mond' dezertiĝas krude.
Forflugis suden la lasta anser',
barakte tra densan nubejon.
Ĉiu vivanto pro vintro-sever'
fosas por si kuŝejon.

Folioj rustiĝas en kaŝa boskej'
kaj for de branĉoj tiriĝas.
Moment' ĝis belecon perdas herbej'
plorinde mallonga fariĝas.
Floroj feliĉis sub la sun',
bele buntigis la korton.
Eĉ ne unu restas nun;
jam velkis ili en morton.

Formortas en juna sino sopir',
kaj velkas flor' kaj feliĉo
je tiu estingo de arda dezir'
per salaj larmoj en riĉo.
Formortas viv', formortas esper',
je kiuj mi reve avidis.
Turniĝis la am' al ĉagrena mizer',
ĉar min la knabo perfidis.

Nun regas ĉi tie trista frid',
lacigas min lok' kaj horo;
Forprenis ĉion de mi la perfid';
kaj brulas kaj sangas la koro.
La maro ruliĝas forte al land',
kaj la pluvo drivas kaj drivis.
Susuras kanto laŭ nuda strand',
ke nun do ĉio finiĝis.

## Senkonsila

Ho bona vi knab',
ho bela vi knab',
lontane de vi mi eltenas ne.
Logiĝas al vi,
ĉiame al vi;

kaj kien ajn ir'
vekiĝas dezir';
lesive brulas la larma ve'.
Neniam mi feliĉiĝos.

Ĝentila vi knab',
ho, brava vi knab',
por vi mi donus ĉion for.
Mi vivus por vi,
mi mortus por vi
kaj kiel edzin',
oferus mi min
por vin liberigi de ajna dolor'.
— Ho vi, mi vin fidis elkore!

Jen mi en fidem'
dum via alprem'
forgesis aflikton, kaj pasis ĉagren'.
Neniam plu
mi trovos vin,
neniam plu
ni vidos nin,
kaj brulas plor' en la brust' en trem'.
— Ho ve, ke vi povis perfidi.

Nun kien la vid'?
Al kiu la fid'?
Vojeton aŭ ponton ne trovas mi.
Mizeras la sort'!
Min logas la mort'!
Kaj kien la ir'?
Al tomb' la dezir'!
Vi estis la sola en vivo por mi!
Neniam plu tagon de ĝojo.

## Ke mi forgesu!

Okaz' plej eta min memorigas;
ĝi hantas min, kaj ĝi min larmigas;
je plej malgranda vortet' pri vi
kun kora plor' tuj foriras mi.

Neniam plu mi ĉagrenon havus
se en forgeson mi min forsavus;
ho, mi malsanus ne plu, se mi
forgesi povus pri vi, pri vi.

## Kiele?

Kiel fariĝis por mi, Injet'?
Ne estas mi sama knabinet'!
Petole mi kuris sur kamp', laŭ lag'.
Ne estis longa por mi la tag'.

Aspekte sonĝo kaptis min;
memor', mi ne plu komprenas vin.
La sama mi estas en taga rond',
sed tamen kiel en fremda mond'.

Mi ĉion tenas en klara vid'.

Mi ĝojis, sed perfidiĝas fid';
kaj ĉio samas sur ej', en hejm',
alia tamen, tamen nur ŝajn'.

La dom' situas kie staris ĝi.
Mastrumas Panjo kiel faris ŝi.
Aridas hejm' kie mankas vort',
patrin' fremdiĝas sub tia sort'.

Fremda marĉo! Fremda altej'!
Fremde aspektas bovin' en paŝtej',
alien turnas sin ĝia rigard',
kaj min ĝi celas nur je hazard'.

Gapas fride la griza mur';
regas trist' en angula obskur'.
Rigidas mano, pied' kaj sin';
pezige ĉio kontraŭas min.

Fenestre gapas mi en dezir',
mi bird' en kaĝ', en sopir', sopir'.
Neniun mi vidas sur kamp' aŭ lag'.
Por Injo nun longa estas tag'.

Ho, hejmo mia, jen en sekur'
mi vivis feliĉa en ŝirmo de l' mur'.
— Ho Panjo! Estas ne plua ĝoj';
L' animo ŝteliras laŭ fremda voj'.

## Vintro-ŝtormo

Ke ege kraku en ŝira forto!
Skuiĝu domo, kaj tremu korto!
Rompu ĉion rompiga far',
ke malakriĝu en pens' amar'.

Se prenus domon kaj kabaneton
ventego, donus ĝi forgeseton.
Se l' tero cedus en sia grund', —
forges' ekregus en kor-profund'.

Se el ĉiel' falus nub' vagante,
se flusus mar' ĉion inundante,
se l' tuta mondo mergiĝus for, —
fariĝus paco en fina hor'.

## En la kirko

En kirkon ŝtele kaŝiras mi;
forgesas pastron kaj vorton de Di'.
— mi povra!
Mi ŝarĝas pekon post pek' sur min
por ŝance povi ekvidi vin.

Je vid' de vi sangas mia kor'.
Vi estis cel' mia por ador',
— mi povra!
Okuloj fajras kaj ardas vang',
esper' vekiĝas en varma sang'.

Dezerto regas, sen vi en vid',
kaj mortas sentoj en kora frid',
— mi povra!
Treniĝas hejmen mi en peza dub'.
Vagadas pens' kiel nokta nub'.

Se ante sidas tiu in'
kun larĝa dorso kaj pav-anim',
— mi povra!
mi maliciĝas en venĝa sopir'
ĝis bruo vekas min por elir'.
— Ho, savu nin el la peko!

## Svatanto

Elrampas rokeja gnom' el sub tuf'
kun kornoj sur kapo kaj kapra huf'.

Neniam vidis vi barbon tian;
atingas ĝi magran kruron lian.

Neniam vidiĝis tia haŭt';
sulkiĝas ĝi ĉirkaŭ gnoma paŭt'.

«Kuradis mi plenajn jarojn centojn.
Neniam mi spertis pli varmajn ventojn.

Ol vin mi ne vidis pli belajn inojn,
sed tamen vi daŭre paŝtas ŝafinojn.

Vi estas en la dekoka jar',
ankoraŭ virga sen svatanta ar'.

La mondo estus ja ŝanĝiĝinta,
se vi ne estus edziniĝinta.

La mondo estus nur stulta afer',
se vi ne riĉiĝus per or' kaj ter'.

Sed ne aŭskultu la Blu-mont-ulon,
tian senkornan flavbekulon.

Aŭskultu ne al la Blu-mont-ul',
senpantalona malriĉul'.

Ne fidu lin, li nur flate blagis;
patrino lia almoze vagis.

Laŭ via volo mi estos viro
por kontentigi vin laŭ deziro.

El tuk' kovranta vian koron
eltiros mi vian am-doloron.

El ĝi mi tiros vian malamon;
ŝi ĝin ricevos manĝe kiel salon.

Ŝi morgaŭ kuŝos kun vea kri';
post du semajnoj silentos ŝi.»

Injet' malligas leĝeran tukon;
sed haltas tuj; ĉar ŝi sentas kulpon.

Ĉu fari? Voli? — Ŝi maliciĝas.
Detiras tukon; ĝi al gnom' doniĝas.

«He — he!» la gnomo en ĝojo mekas;
«sed pagon havu mi,» tuj li blekas.

«Kiam tomben ŝi portiĝos,
Al mi Injeto fianĉiniĝos.

Neniam sentu vi plu doloron.
Sur vin pendigos mi brilan oron.

Mi ne fanfaronas en nura vent'.
Bovinojn mi havas ĝis dek du cent.

Porkojn je nombro de ŝtonoj en sablo
mi havas, kaj ŝafojn trans nombra kapablo.

Grundon mi havas ĝis mont' sub la stelo.
Riĉa mi estas, kaj lustras el belo.

Kornojn mi havas, bravulan signon.
Postaĵe la vost' donas kroman dignon.

Por vi plej bona fianĉ-omaĝo
de riĉa vir' en la ĝusta aĝo.»

«Ne volas mi! Ne mortu ŝi!»
eliĝas el Injo pentema kri'.

«Foriru! Redonu al mi la tukon!»
Ŝi preĝe faras per brakoj krucon.

For estas tuj la saltanta gnom';
la tuk' postrestas ĉe griza ŝton'.

Sur tufa roko kuŝas tuketo;
pro penso malica tremas Injeto.

## Maltrankvilo

Mi kiel fartos, Dion forgesanta,
kun kor' en ama pasi' revanta?
Mi kiel fartos laŭ certa sci'?
Min mem ja forperdigis mi.

Neniam mi min relevi povos.
Neniam plu mi min mem retrovos.
Bariĝis vojo kaj eĉ esper'. —
Per vi mi savus min el sufer'.

## Preĝo

Ĉiela reĝ', ho helpu min!
Mi luktas en doloro.
En senespero tordas sin
la laciĝinta koro.
Malbono havas tro da fort';
por ĝin esprimi mankas vort'.
Mi brulas en angoro.

Ĉiela reĝ', ho helpu min!
Aŭskultu petan vorton.
Vi luktis mem ĝis venka fin'
spitante fian forton.
Teruras lukto en mizer'!
Vi estu ĉe mi en sufer'.
Vi povas ŝanĝi sorton.

## Erarvoje

Tempoj pasas en lanta flu'.
Vadas la viv' en mizer'.
Dion bezonas anim' post sku',
post perdo de bona esper'!

Vintro kuŝas sur frida mond'.
Ĉu iam mildiĝos ĝi?
Helpu animon sur ŝtorma ond'
perdinta fidon je Di'!

Laciĝas en pezaj penoj Injet';
perdiĝas kuraĝ' kaj fervor'.
Erare ŝi iras laŭ voj' kaj vojet',
trolejen ŝin pelas dolor'.

Nokte trolejon trovas ŝi.
Jen fine decida moment'.
«Aŭdu! Min nun enskribu vi,
por trinkaĵ' de amora tent'!

Donu trinkaĵon, ke turnu li sin
al mi, sia ĝusta am'.
Almenaŭ nokton posedu mi lin
kaj poste perdiĝu en flam'.»

Ridete pendigas la aĉa virin'
kaldronon dum eksorĉad':
«He-he! tiel oftas, ke tia la fin',
sed fidu je mia traktad'.»

Ŝi verŝas el korno kaj miksas el glas',
murmure zumante kantojn.
En akvo elnorda ŝi kirlas en vaz'
radikojn kaj toksajn plantojn.

Kaldrone bolas kun knar' kaj ĝem',
sorĉade kantas ŝi:
«Nun bolas larmoj, nun bolas trem',
nun bolas kora pasi'.

Bolas ardanta, varma sang',
bolas sopira ĉagren',
bolas pere de galdra lang',
bolas kun pulv' kaj venen'.»

El brust' de Injeto tri gutojn da sang'
ŝi tiras kaj faras trinkaĵon.
El aĵo de l' kata subventra flank'
gutigas ŝi elfluaĵon.

«Perfidon, damaĝon forsorĉas mi.
Mi sorĉas per ĉiuj potencoj.

En sango kaj osto — trioble tri —
silentu la falsaj sentoj!

Mi galdras pri Jon en Skarebrot,
per galdra brogaĵet'.
Je trink' turniĝu la am-dorlot'
al lia ino, Injet'.»

Kraĉas ŝi ŝaŭmon al la kaldron',
ŝvebas flava sulfur'.
Ŝprucas haladza vapor' al plafon',
krakas la doma mur'.

«Trioble tri, en nom' de Satan',
estro de l' profundejo.
Satano! Satano! — Huj la ekflam'!
— Atendas vin abismejo.» —

El flamoj manon la sorĉistin'
levas en tomba silent'.
Venkas Injeton penta tim'
kaj svena, vertiĝa sent'.

Ŝancele dancas plank' kaj fajrej',
ĉio strange moviĝas.
Ŝi kuras sur ŝtona, tufa altej'
kiam ŝi rekonsciiĝas.

## Ŝi vekiĝas

Injet' silentis en malfort'.
Diriĝis iu eta vort'
en flustra klar': Patrino.
Intenco kia! Ĉu kaŝi sin?
Ŝi hontos antaŭ la patrin'.
Ne taŭgas ke ŝi plendas.
Abisma fin' atendas.

Doloras kor' pro pek' kaj hont'.
Ekstaras el mistera font'
estaĵo neĝe hela.
Pendas riĉe la mantel'.
Injeto petas en ŝancel'
al la fratin' fidela
por help' en sort' kruela.

«Beata, kara, vi fratin'!
Min helpu! Morto prenos min.
Al inferul' mi jesis.
Laŭ fipotenco de Satan'
li kaptis min per sia man'.
Min gardi mi forgesis,
per ĵur' al li promesis.»

«Vin turnu al kreant' de l' sun'.
Ne tute vi perdiĝis nun,
fratinjo, en hororo.
Retiru vin per forta kor'!
Trinkaĵon pekan ĵetu for!
Toleru en doloro!
— Kreiĝis vi al gloro.»

Forŝvebas kanto kaj vizi';

denove sola staras ŝi
en la inico sia.
Batalas ŝi ĝis venka fin'.
Rekuraĝiĝas la anim'
per ŝia preĝo pia.
Ŝin savas «Patro Nia».

Returnas ŝi en laca kur',
retrovas ejon de l' terur',
ektiras la pordaĉon.
«Ne volas helpon mi de vi!
Mi turnas min de vojo ĉi!»
Ŝi ĵetas botelaĉon
en flaman ardantaĵon.

## Peza momento

La longa vintro finiĝas,
kantante je sia forir'.
Deklivoj blankaj bruniĝas;
ŝvele fluas river'.
Anstataŭas radoj glitilojn
sur vojo, vojeto kaj pad'.
Drivduŝas pluv' la altejojn
kaj domojn per frida gutad'.

Jen ene en la ĉambreto
sur alta kaj mola lit'
delira en sia dormeto
kuŝas malsana Injet'.
Ŝi dormas je tristaj tonoj
tra fendoj en trunka mur'.
Parolas multaj sonoj
en venta, elmara susur'.

En dorm' ŝi lamente sopiras,
ke kantu la vent' pri la sort'.
Pri tiu ton' ŝi deziras,
ke estu ĝi tono de mort'.
La knab' plenumonta la verkon
edziĝi kun in' en perfid'
renkontu la nigran ĉerkon
kun Injo en frida rigid'.

Sed dorme juneco fortiĝas
kiel nokte ŝvela burĝon'.
Injeto sin ellitigas.
Li rajdas al kirka dom'.
Ĉe verda fenestro ŝi sidas,
turniĝas rigard' al nord'.
La nuptaron la sun' eklumigas,
kaj gajigas ludista kord'.

Al lit' ŝi returniĝas;
ekkaptis ŝin malfort'.
La vangoj de larmoj bruliĝas,
sed palaj kvazaŭ pro mort'.
Tordiĝas ŝi noktojn kaj tagojn
en senripoza sku',
kaj falas en lamentadojn
ke devas ŝi vivi plu.

Kun hajlo kaj splitoj glaciaj

kaj morda, frostiga pov'
la vento-tagoj vintraj
turmentas per ŝira blov'.
Malbonas temp' pro drastaj
ŝanĝiĝoj de la veter'.
Estas la luktoj lastaj
ĝis venkos primaver'.

## En «Blua-Monto»

Pluva pendas l' aero.
De branĉoj kaj vergoj gutadas.
Nigra, humida elmara nebul'
ĉion aspergadas
sub volviĝanta nuba rul'.

Kaj al la okul' distingeblas
nek kampo nek korto nek turo.
Kvazaŭ glutita de akva inund'
kaŝiĝas la land' en obskuro.
Aspektas la ejo mara profund'.

En erikejoj malhelaj
kolektas Injeto la ŝafojn.
Tondro de l' maro vokas en ŝi
pense pezigajn imagojn.
Ekglitas ŝi trete sur glaci'.

Sorĉiĝas ŝi en nebulon,
plurfoje ŝi devojiĝas.
Vokas ŝin kri' kaj vaganta susur',
sorĉaĵoj en vivon vekiĝas;
aŭdiĝas mistera rivera murmur'.

Supren el profundejoj
leviĝas ŝvebantoj ombraj.
La nikso sur sia duona ĉeval'
kaj troloj vilharaj sennombraj
sin ŝovas antaŭen amase el val'.

El mont' kaj rokaj kavoj
rajdas vicoj elsonĝaj
antaŭen super profunda marĉeg'
kaj laŭ la vojoj longaj
kun tinta bruo kaj muĝa krieg'.

Dum tie ŝi vagas en revoj,
de vunda memor' ŝi ŝiriĝas,
en elf-danc-ringo troviĝas ŝi,
kaj tie ŝi ensorĉiĝas
kun mur' de nebulo ĉirkaŭ si.

*

Injeto en mir', pro sorĉa fort',
staras meze en reĝa kort'.

De domoj kvarflanke ŝirmita mond'
kuŝas kviete sub luna rond'.

Ĉirkaŭ la mola korta herbar'
staras portiko sur arka ar'.

Portas kolonoj el pura arĝent'
orajn frontonojn sub doma tegment'.

Arkoj kunligas kolonojn sub tur';
drak' kaj serpento meandras sur mur'.

Alte lumas la reĝa kastel'.
Flamas el kupro tegment' al ĉiel'.

Glimaj turoj etendas sin
kun oraj kokoj sur pinta fin'.

Sorĉita ŝi vidas ke paron post par'
elvenas la kortegana ar'.

Arĝento kaj oro kaj blanka lin'
orname radias de ĉiu knabin'.

Sonoriletoj per tinta sonoro
emociigas Injeton al ploro.

Eksekvas saltodanco sen brid'.
Tiriĝas Injet' inter plor' kaj rid'.

Kaj fine jen melodi' tiel bela,
ke sentas ŝi sin en feliĉo ĉiela.

Dancas knabinoj kantante al Injo:
«Ĉi tie vi vivos ĉiam en ĝojo.

Jen vidu la reĝon! Se nun vi restos,
kronon el oro kaj floroj vi portos.»

Jen vidas ŝi sub la arkaĵa or'
reĝon staranta en brila kolor'.

Purpura vestaĵ' kiel ruĝa sango,
krono el oro laŭ reĝa rango.

Reĝa vergo kun flava flam'
lumas en lia dekstra man'.

Glora li estas. Ŝi volas cedi!
Ŝi volas tian dignon posedi!

La danco viglas en svingo kaj tord'.
Logas per lud' violona kord'.

En ravo kaj ĝojo ŝi «Jes» por respond'
donas al bela knabina rond'.

Jen la knabinoj en blanka lin'
etendas kruĉon plenan de vin'.

«Trinku, gajnu feliĉon reĝinan!
Trinku, forgesu aflikton vian!

Trinku el la kruĉo, kaj trinku ĝis fund'.
Tuj forgesiĝas la kora vund'.

Ne pripensu! Eniru la ĝojon!
Feliĉon ofertas ni lastan fojon.»

*

Al Injo paliĝas la bruna vang',

fridiĝas en ŝi la kora sang'.

Injeto sur brunaj vangoj paliĝas.
Revenas memoro; pensoj vekiĝas.

«Ĉu mi forgesos aflikton de kor'?»
— «Ĉiujn afliktojn pelos ni for.»

«Ĉu vi estingos la fajron en sin'?»
— «Trinku, kaj poste ne sentos vi ĝin.»

«Ĉu vi estingos afliktan flamon?
— Por nenio perdu mi mian amon.

Prefere al perdi aflikton amaran
mi iru almoze inter la homaron.

Prefere al forgesi korbrulajn plagojn
mi iru mokata inter la vilaĝojn.

Prefere al forgesi la trovitan knabon
sola mi faru mian vagadon.

Neniu alia min premu al sin'.
En nom' de Jesu' liberigas mi min.»

Ĉio malaperas: reĝo, domoj, fostoj,
kaj en la nebuleto forfuĝantaj vostoj.

## Libera

Dum nokta pac' ĉe lita fin'
en longa nigra vest' virin'
sin montras al Injeto.
La franjo staras apud ŝi,
hele bela la vizi'
kun sankta ĝoj-rideto.
Ŝi kantas en kvieto:

«Vi fratinet' de mia kor',
nun servos vi al la Sinjor'.
Jen sankte sonoriĝas.
Vi tiris vin el trola prem';
kaj trovis en dolor' vin mem.
Vi supren nun leviĝas.
Alteco atingiĝas.

Nun venu akompani nin;
la nova voj' kondukos vin
al lumo, kaj tagiĝos!
Kruta, longa vojo ĝi;
Injet', ne timu tamen vi,
eĉ kiam vi laciĝos.
La sort' por vi ordigos.

Jen staras muzo de l' saĝec'.
Vidigos ŝi tra malklarec',
kaj vi per ŝi proviĝos.
Ŝi gvidos vin eĉ tra infer'.
La leĝon de la viv' sur ter'
vi tra teruro vidos;
honor' por vi fariĝos.»

VORTOJ

montarino

— Ino kiu vagas kaj vivas inter montoj kaj kies animstato influiĝis de tio; moknomo ĉi tie.

menianto

— Floro tre ŝatata de bestoj. (_Menyanthes trifoliata_)

ardeo

— Birdo kun loka nomo Gråhegre. (_Ardea cinerea_)

pluvio

— Birdo kun loka nomo Heilo. (_Pluvialis apricaria_)

kanto

— 1) Kanto kun muzika melodio. 2) Deklamado, ekzemple la Edda-kantoj, kaj ĉi tie «La Kanto de Gumlo».

draŭgo

— Martrolo aŭ reaperanto.

Mons

— Nomo de virkato.

Lars / Per

— Virnomoj.

Manjo

— Virina nomo.

Holand / Vatn

— Nomoj de bienoj.

huldro

— Ege bela subterulino, kiu paŝtas la brutaron samloke kie la homoj, sed nevidata krom hazarde foje. Ŝi havas voston.

saltodanco

— La norvega danco «Springar», nesimetria triritma.

Haukeli

— Montara regiono inter orienta kaj okcidenta Norvegio.

skaras

— Onomatopeo; la sono kiun eligas la pigo.

erikserpento

— Mitologia serpento kiu kreskis al drako kaj kuŝis ĉirkaŭ la domo de princino.

Skarekula

— Monto kie Satano kaj gesorĉistoj kunvenas. (Blokksberg)

Haŭgastad

— Hejmbieno de Injeto.

Amund / Jon

— Virnomoj.

Brot

— La bieno de kie venas Jon. «Brot» = novkultivejo.

Skarebrot

— «Skar» = fendo.

Dokka

— Ofta bovina nomo kun signifo «Pupo».

vaglumo

— Lampiro, lumvermo.

galdro

— Sorĉado; vorto el la norena mitologio.

Hel

— Norena nomo de Infero. Ankaŭ nomo de la norena estrino de tiu loko.

Majstro

— La Kreanto

Gro

— Virina nomo.

Knut

— Virnomo.

Jotuno

— Giganto.

fimbulvintro

— Ege severa vintro. Unue prirakontata en «Voluspá»

di-martelo

— La martelo de la Tondro-dio Tor. Ĵetinte ĝin li ĉiam trafis giganton mortige, kaj la martelo reen flugis en lian manon.

blanka kruco

— Kristanismo oficiale decidiĝis en Norvegio en la jaro 995 de la reĝo Olav Trygvason.

Ragnarok

— Fino de la mondo. Fina lukto inter la dioj kaj la gigantoj, aŭ inter kulturo kaj primitiveco, aŭ inter Bono kaj Malbono, aŭ inter Dio kaj Satano. Priskribita en la Edda-kanto «Voluspá».

meandras

— Serpentumas. En la helena arkitekturo serio de kurbiĝoj en ornama linio laŭ la randoj ekzemple de frontonoj. En norvega mezepoka arkitekturo tio reprezentiĝas per drako kiu meandre beligas ekzemple ambaŭflanke portalojn de fosto-preĝejoj.

KLARIGOJ

Prologo

La prologo fakte estis verkita post la plenumiĝo de la tuta poemaro. La poeto dediĉas sian verkon al la pejzaĝo de Jären, la vasta apudmara plataĵo en sudokcidenta Norvegio sude de la urbo Stavanger. Agrikultura regiono kaj bestobredado. Ŝafoj paŝtiĝas en la deklivoj de la malaltaj montoj iom interne en la regiono. Tiu pejzaĝo donis la poezian kadron al la poemaro.

